

Leterkesto

Claude Gacond, 116-a radioprelego, 1965.12.22 & 1965.12.25

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond.

Pro la interrompo de nia esperanta programo multaj leteroj de fidelaj geaŭdantoj restis sen respondo. Tial kun pardonpeto pro nia malakurateco ni hodiaŭ ilin malfermas kaj respondas al iliaj demandoj.

Sinjoro Alfred Wenger, pediatro en Neuchâtel, Svislando, ŝatis nian preleg-serion pri la heroo vivo de Henri Dunant kaj enskribiĝis por ricevi la multobligitan tekston de tiu elsendaro. Ni citas lin : « *Mi miris pri tute nekonataj faktoj kaj flankoj de Henri Dunant, nia fama samlandano.* » (Fino de la citaĵo.)

La interrompo de niaj elsendoj subite ĉesigis tiun preleg-serion. Al tiu temo mi revenos venontan jaron, kaj en *Inter Ni*, organo de Esperanto-Edukistaro de Svislando, estos publikigitaj tiuj elsendoj, kiuj ankaŭ plaĉis al sinjoro Kurt Petersen en Köln, Okcidenta Germanio, sinjoro Gerhard Kunze en Berlino, sinjoro Gaston Vidal en Aubièr, Francio, kaj sinjoro Richard Schneller en Chur, Svislando.

Kiel la neŭŝatela pediatro, tiu alia svisa aŭdanto esprimas la deziron povi sekvi niajn elsendojn sur alia ond-longeco. Mi respondas al ili, ke tio certe efektiviĝos, kiam la svisa esperantistaro sisteme skribos tiun ĉi deziron al siaj regionaj elsendejoj. La kurtaj ondoj estas ĉiam malfacile aŭdeblaj proksime de la elsendejoj, ĉar ili devas esti respegulataj de la jonizita tavolo. Permesu klarigan komparon. Vi certe iam amuziĝis dum montara ekskurso kii por reaŭskulti vin poste pere de eĥo. La ondojn de via krio rokaro reflektas, kiel spegulo reflektas vian bildon. Ĉirkaŭ la tero okazas io tre simila. Je alteco inter cent kaj tricent kilometroj troviĝas zono da atomeroj nomata jonizita tavolo. Estas dank'al tiu tavolo, ke sur la tero oni povas aŭdigi ĝis tre malproksime radioprogramon pere de la kurtondaj ondoj. El la svisa kurtonda radiostacio ondoj estas dissendataj ĉielen. Kiam tiuj ondoj atingas la jonizitan tavolon, ili estas reflektataj sur la teron, kiam ili atingas la teron, ili ree estas reflektataj ĉielen, kaj denove la jonizita tavolo ilin reflektas teren. Tiel tiuj ondoj povas ĉirkaŭiri la teron. Se tiu jonizita tavolo ne ekzistus, la dissenditaj ondoj perdiĝus en la universon, neniam ili revenus teren, kaj neniam svisoj povus paroli al japanoj pere de la radio.

Por povi bone kapti la kurtajn ondojn, oni devas povi ricevi ilin nerekte, sed reflekte. Bedaŭrinde Neuchâtel kaj Chur situas tro proksime de Schwarzenburg, kaj tio ne eblas. Vi ricevas tiujn, kiujn la nuboj hazarde vin reflektas kaj tiujn, kiuj eble rondiris la tutan teron. Tamen mi esperas, ke tiu rapida kaj simpligita klarigo ne malkuraĝigos vin aŭskulti nian esperantan programon, ĝis kiam mez-ondaj regionaj elsendejoj sub via peto trovos loketon en siaj programoj por siaj esperantistaj geaŭdantoj.

Estas interese konstati, ke iuj temoj estas karaj al niaj geaŭdantoj. Dum du elsendoj pasintan jaron mi prezentis la laboron de la movado por ĝemeliĝo de urboj kaj vilaĝoj. Mi promesis broŝuron al la interesatoj. Alvenas ankoraŭ nun petoj pri tiu temo : sinjoro Salvatore d'Isidoro en Firenze, Italio, skribas : « *Mi aŭdis pri ĝemeliĝo de la urboj. Mi volus sugesti, ke vi sendu broŝuron en la franca lingvo al la urbo Pescara. Ĝi estas mezgranda moderna itala urbo, kiu situas sur la adriatika marbordo. Mi dankas vin kaj vin gratulas pro via bona laboro en la kampo de la homa interkompreno.* » Ni efektivigos tiun deziron kaj sendos ankaŭ al nia blinda aŭdanto tiun broŝuron, esperante ke familiano ĝin laŭtleĝos al li. El la sama lando skribas sinjoro Salvatore Fiorentin, kirurgo en Padova, por ricevi tiun broŝuron. Ĝi ne ekzistas en esperanto, mi do sendos al vi, kara samideano, la francan eldonon.

Sinjoro Oskar Breddermann en Esslingen, Okcidenta Germanio, ŝatis tiun broŝuron pri la ĝemeliĝo de urboj kaj ĝin fordonis al funkciulo de Germana Esperanto-Asocio. Li petas aliajn ekzemplerojn por diskonigi en la esperantaj mediojn la ideon pri urba ĝemeliĝo. Ni nur povas subteni lian intencon. La diversaj internaciaj movadoj sin nesufiĉe konas. Inter ili

Leterkesto

Claude Gacond, 116-a radioprelego, 1965.12.22 & 1965.12.25

mankas kunlaboro. Tiuj broŝuroj permesu kontaktojn inter esperantistaj grupoj kaj iliaj urbestroj.

Post la elsendoj de la 10-a kaj 17-a de novembro skribis kelkaj geaŭdantoj por ricevi la tekston de la prelegoj de Pierre Hirsch kaj Henri Vatré pri Edmond Privat. Ni salutas ilin kaj sendas hodiaŭ la promesitan bultenon *Inter Ni* de Esperanto-Edukistaro de Svislando. Bonan tagon gesinjoroj Gaston Turin en Pontarlier, Francio, fraŭlino C. Hueter en Clermont-Ferrand, Francio, denove sinjoro Gaston Vidal en Aubiére, Francio, kiu sendas esperantan prospekton de la urbo Vichy kaj informiĝas, ĉu sinjoro d-ro William Perrenoud en Neuchâtel ĉiam vivas. Li faris interesajn paroladojn en la kulturdomo Grésillon pri geonismo. Jes doktoro William Perrenoud bone fartas. Li ĵus tradukis la enciklikon de Papo Paŭlo sesa : *La vojoj de la Eklezio*, teksto ĵus eldonita de la eldonejo Ekumena Esperanto en Svislando.

Ni salutas sinjoron Jean Margenot en Flize, Francio, kiu dankis pro ricevo de la broŝuro pri la Ĝemeliĝo. Kaj kiel konkludo al tiu samideana babilado ni salutas sinjoron R. Viller en Houilles, Francio, fidela aŭskultanto de nia programo kaj de Radio-Ĝenevo. Li aŭdis rakonton pri folkloro kutimo en la kantono Neuchâtel. Temas pri « torrée ». Ĉar mi estas adepto de tiu folkloro kutimo estas al mi plezure rakonti pri ĝi.

En la Montaro Ĵuraso dum la belaj aŭtunaj liberaj tagoj estas kutimo familie renkontiĝi por kuiri en grandaj fajroj kolbasojn, lardon aŭ eĉ kokidojn. Oni grupiĝas en paŝtejoj kaj unue rikoltas sekajn abiajn branĉojn por konstrui grandan fajron. Oni sidas ĉirkaŭ ĝi dum ĝi brulas ĝis kiam nur restas ruĝaj kaj varmegaj braĝoj. Tiam oni pakas la kolbasojn aŭ aliajn viandaĵojn per simpla ĵurnala papero aŭ per alumina papero (tiu metodo modernigas). Oni faras en la braĝoj truon, kaj metas en ĝin la pakitajn viandaĵojn kaj terpomojn. Oni kovras ilin per la braĝoj kaj remetas lignon kaj atendas ĉirkaŭ la fajro duonan horon pretigante sin por la pikniko. Tiam oni reserĉas la kolbasojn kaj diras al si reciproke : « *Bonan apetiton !* »

Verŝajne aliaj montaraj kaj arbaraj regionoj konas similan kutimon. Ĉe ni ĝi nomiĝas « torrée », el la franca verbo « torréfier », kiu signifas rosti aŭ baki. Ofte dum esperantistaj regionaj renkontiĝoj ni organizas tiun ceremonion, kiun ni nomas **toreo**.

Vi aŭdis Radio-Svislandon per la voĉo de Claude Gacond, kiu diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-